# LEA festis sian 20-jariĝon inter la arboj

**Okaze de sia 20-jariĝo, la 31-an de majo la Limburga Esperanto Asocio (Limburgse Esperanto Vereniging) regalis siajn gastojn per bela kaj frandoplena festotago.**

La tradicia Limburga Tago okazis en la verda ĉirkaŭaĵo de Hechtel-Eksel, kie proksimume dudeko da esperantistoj el diversaj landoj kaj regionoj kunvenis por komuna festado, naturo kaj amikeco. Ĉi-jare la etoso estis eĉ pli feria ol kutime, ĉar la loka klubo festis sian dudekan datrevenon kaj pro tio malavare regalis la partoprenantojn per kafo, tipa limburga torto (vlaai) kaj abunda pikniko.

La aranĝo altiris rimarkinde varian publikon. Inter la ĉeestantoj troviĝis ne nur flandroj kaj valonoj, sed ankaŭ gastoj el Germanio kaj Italujo. Elstara surprizo estis la partopreno de Brandon Sowers, la nuna prezidanto de Esperanto-USA, kio donis al la tago agrablan internacian dimension.
Plia honoro por la lokaj aktivuloj estis la ĉeesto de la skabeno pri turismo, Raf Truyens. Li ne nur faris oficialan kaj frapan enkondukon, sed ankaŭ restis surloke por trinki kafon kaj kunmanĝi la limburgan torton kun la esperantistaro. Lia sincera interesiĝo pri Esperanto kaj ĝia movado tre ĝojigis kaj kuraĝigis la organizantojn.

## Biciklado altnivela kaj arbara ludo

Post la lunĉo, la partoprenantoj dividiĝis laŭ intereso por esplori la proksiman Nacian Parkon Bosland. Kelkaj elektis la unikan sperton "Biciklado inter la Arboj" (nl: *Fietsen door de Bomen*), kiu estis malfermita en junio 2019. Tiu ĉi speciala vojo ebligas al la biciklantoj iom post iom supreniri ĝis alteco de dek metroj en unika cirkla ponto rekte inter la arbopintoj.

La ĉeforganizantino de la Limburga Tago, An Olijslagers, gvidis la bicikladon kune kun sia edzo. Kvankam la regiono estas konata kiel vera paradizo por biciklistoj kaj eblis tre favorpreze lui tutnovajn elektrajn biciklojn, la biciklada grupo restis tre modesta: nur ses homoj entute profitis de tiu ĉi ebleco. Tamen, la ekskurso estis treege agrabla, precipe ĉar An denove sukcesis mendi perfektan, sunan veteron por la tago!

Dume, la promenantoj sekvis Emilion en la arbaron por tute alia speco de aventuro. Ankaŭ la promenantoj supreniris la saman cirklan ponton por promeni alte inter la arboj. Pluraj elektis tiun manieron por pli trankvile povi ĝui la elrigardon al la arbosuproj sur tiu cirkla ponto. Emilio preparis tre amuzan kaj ruzan ludon: la partoprenantoj devis serĉi specifan, kaŝitan arbon. Al la unua trovinto li promesis dolĉan premion – skatolon da bonaj ĉokoladoj. La tasko montriĝis tiel malfacila en la densa naturo, ke neniu kapablis trovi la ĝustan arbon sen iom da helpo de Emilio mem. Post vigla serĉado, Lode finfine estis la unua, kiu malkovris la celon kaj rajtis hejmenporti la ĉokoladon.


## Bongusta vespero kun pacienco

La tago finiĝis per komuna vespermanĝo en loka restoracio (Eetcafé De Lage Kempen). La elekto de la loko montriĝis bonega rilate al la kvalito de la pladoj: la manĝaĵoj estis bongustegaj kaj la konversacia etoso restis tre vigla kaj amika ĉirkaŭ la longa tablo. La sola ombro sur la vespero estis la malrapida servo, ĉar pasis sufiĉe da tempo antaŭ ol la kelnero venis por noti la mendojn, kio sekve kaŭzis prokraston ĉe la kuirejo. Kvankam tio iom testis la paciencon de la

gastoj – precipe de tiuj, kiuj devis veturi ankoraŭ longan vojon por atingi sian hejmon tiun nokton –, la ĝenerala sento pri la Limburga Tago restis tre pozitiva. Koran dankon al la organizantoj!

Arkiva paĝo kun komuna fotaro aperas en https://benelukso.eu/lt26/

*Yves Nevelsteen*




Door de bomen
bos zien